# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**



PLENUMITA 17/07/2024 sescentnaŭdeksesa eldono (unua eldono 26/09/2011)

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan auskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**Laboratoria viando kun bona rostogusto** 13a julio 2024

## Komentoj pri AE 695

LBV por Edukado: Kortuŝa filmeto, gratulojn al LBV. (Interesas min, de kie venas la mono por la donacetoj.)

Ĉu pingli ĉu ne? Mi feliĉas pro la surmeto de la Esperanto-stelo. Sed ne multe plaĉas al mi la signaloj kiuj reklamas la diferencojn inter homoj. Iam mi demandis al indonezia amikino kial ŝi ne surportas la islaman vualon surkape. Ŝi respondis, kun rideto, "Mi surportas ĝin en mia koro." Kia belega respondo kaj ago. Se nur la islama vualo (kaj bur'o!), kristana kruco, juda stelo kaj jarmulko, hindua kastosigno, sikha turbano, ktp, estus envolvitaj en la koro, por silente nutri la plej bonajn agojn de la koncerna religio, por ke ili helpu la afablan kunvivon kaj kunteniĝon de la homaro.

10 cenda botelo/ladskatolo redono: De 1a de oktobro 2020 tiu redono por malplenaj trinkujoj funkcias en Perto. Mia edzo ne volas trinki simplan akvon, do, ĉiusemajne mi aĉetas por li soda akvon. Kiam akumuliĝas ĉirkaŭ 100 boteloj, ni iras interŝanĝi ilin por la redono. Dum jaroj la kosto de la soda akvo estis po 75c por 1.25L botelo. Fulmrapide post la enkonduko de la 10c redono, la prezo kaj en kaj Coles kaj Woolworths kreskis de la kutima 75c, al $1.00! Post nelonge, $1.20, kaj nun, $1.30. Do, preskau duoble en malpli ol 4 jaroj. Tute ne surprizos min vidi salton al $1.50 iun baldaŭan tagon...

Komenco pozitiva mia, sekvo neŭtrala, plendo en tria alineo, kaj nun, pozitiva fino 😊: Lastan vendredon vizitis min Deborah McCarney, kiu nun loĝas en Vitoria-Gasteiz en la vaska regiono en norda Hispanujo. Debra vere estas civitano de la mondo, kaj estis ege plezure kunbabili kun ŝi dum 4 horoj. Ŝi venis al sia antaŭa loĝurbo, Perto, ĉar mortis ŝia panjo antaŭ kelkaj semajnoj. Ŝi renkontiĝis kun familio kaj geamikoj. Kiam vi legas ĉi tiun artikolon Deborah estos aŭ survoje aŭ jam reveninta en sian elektitan nunan hejmon, kiun ŝi tre ŝatas. Ĉion la plej bonan al nia poliglota Esperantistino. *Vera Payne*



Kara Roger,

eta kontribuo: rilate al la diskuto de Franciska kaj Peter Weide, mi tute ne hontas porti E-stelon. Kaj mi esperas, ke aliaj demandos min, pri kio temas. Esperanto estas integra parto de mia ĉiutaga vivo (kaj Katja kaj mi daŭre parolas esperante). Kial ni hontu? *Trevor Steele*



Kara Roger!

Jen bela bildo kiun la filo de mia filino faris kaj donis al mi mian naskiĝtagon hodiaŭ!

Eble vi povas uzi ĝin en la plej belega kaj bonega Esperanto gazeto en la mondo!

Salutas vin Zammyhof kaj *Bob Felby*




# La Verda Stelo

La Verda Stelo estis unue proponita en iu artikolo de 'La Esperantisto' en 1892 por uzo kiel simbolo de reciproka rekono inter esperantistoj. *Roger Springer*

# La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.

La 27a de julio estos la tria sabato.

Venu! 02 9976 6320 *Roger Springer*